

Ирина Саверьевна
Алексеева ,

Ode a Samarcanda

tradukita de Carlo Minnaja

Ирина Саверьевна Алексеева ,

Odo al Samarkando

tradukita de Manfred Retzlaff

Ирина Саверьевна
Алексеева ,

Odo al Samarkando

tradukita de Vladimir Maslkin

laŭvorta Esperantigo de la germanigo

Argiope-informo:

La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.

Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Mi kantas al vi, ho Samarkand'
Tiun ĉi kanton. Vi restis tiel juna.
Vi estas konata en la tuta mondo.
Kiu vin vidis, tiuj devas vin ami.

Mi kantas vin, ho, Samarkand'
Kaj laŭdas mi aspekton sunan!
Kaj vian koron — Registan' —
Mi ĉiam pretas nomi juna.

Profeto vin iam antaŭvidis
En sonĝo antaŭ longa, longa tempo,
Kaj Temerlan' vin konstruis
En via tuta majesteco.

Korbaton ĝian sub stelar'
Eksentis Ulughbek junece.
Kaj daŭras de Timurcentjar'
Kaj pli ĝi longas majesteco!

Kaj viaj sanktaj haloj, trezorejo
De l' arto kaj de l' instruo,
Jarcentojn ili jam staras tie,
Kvazaŭ apenaŭ pasis tempo.

Madrasoj sanktaj estas nun
La ejoj por la art' kaj sentoj.
Kaj de belec' ilia sun'
Centjarojn igis la momentoj.

Tie ĉi la poeto Navoi
Estas kantinta pri amo kaj forto,
Kaj liaj kantoj ankoraŭ neniam
En tiu lando tute estas forsonintaj.

La poezi' de Navoi,
Je amo kaj je forto riĉa,
Tre helpis al popol' de vi
Fiera resti kaj feliĉa.

La kupoloj de la minaretoj tie ĉi,
Ili lumas tage kiel nokte la steloj.
Per la dekoro de iliaj ornamoj
Ili salutas ĉiun jam de fore.

De minaretoj kupolar'
Similas al stelar' ĉiela,
Beleco de la ornamar',
Lazuro pura kaj tre hela.

...

...

...

Ho Samarkand, urbo de l' saĝeco!
Tie ĉi staras preĝejoj kaj moskeoj,
Kai tiu, kiu vin konas, tiu diras,
Ke en la mondo li vidis nenion pli
belan.

En saĝa urbo de l'anim'
Moske' najbaras kun
preĝejo.
Por homoj, kiuj amas vin,
Vi estas bela rifuĝejo!

Ho Samarkand, floru kaj prospe-
ru!
Via gloro disfamiĝu ĉie,
Kaj eterne nepereema estu!
Ankaŭ estonte nin akompanu!

Ho, Samarkand', disfloru
pli
Kaj gloru vin bonagoj fa-
me!
Kaj flugu al eterno vi,
Restante apud ni ĉiame.

*Traduko de la Rusa poeto
"Ода Самарканду" de Ирина
Саверьевна Алексеева en itala de
CARLO MINNAJA (*1940-03-19).*

Arg-860-2206 (2014-11-13
12:31:20)

*Tiu ĉi poem-italigo aperis en 2013
en la libro "Ода Самарканду".
Ода Самарканду: пер. на 62
языка / И. С. Алексеева ; ред.-
сост.: А. Ионесов . - Москва.
: Изд-во журн. "Юность", 2013
. - 91 с. : ил., 2 л. ил.
Pri la tradukinto vidu la rete-
jon [http://it.wikipedia.org/
wiki/Carlo_Minnaja](http://it.wikipedia.org/wiki/Carlo_Minnaja).*

*Traduko de la Rusa poeto "Ода
Самарканду" de Ирина Саверьевна
Алексеева en Esperanton de MAN-
FRED RETZLAFF (*1938-11-04) en
2013-03-25.*

Arg-860-1736 (2013-03-26 17:48:13)

*Traduko de la Rusa poe-
to "Ода Самарканду"
de Ирина Саверьевна
Алексеева en Esperanton
de Vladimir Masalkin.*

Arg-860-1734 (2013-03-24
15:52:41)